
LVP

# PILO-PRESS

Internacia
Informservo
===============



"Li lernas Esperanton!
Li serĉas radikojn..."

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 40/1975 11 nov 1975

Aperas ĉiusemajne

## Altranga vizito en Paderborn

Paderborn (pp) - Kiel Pilo-Press jam mallonge raportis, la kulturministro de Berlino (Okcidenta) vizitis la Esplor-centron Paderborn la 3-an kaj 4-an de novembro. La kulturministro, senatoro Walter Rasch, estis akompanata de sia persona referento diplom-pedagogo Weil, senatora direktorino Schacht kaj pedagogia referento d-ro Stroux. La delegacio, cetere, venis per la aŭtomobilo de Herbert von Karajan, kiun la mondfama dirigento volonte pruntedonis tiucele, ĉar la senatora aŭtomobilo devis esti riparata.

La altrangaj gastoj volis ĉefe informiĝi pri la stato de la planlingva instruado, kiu okazas en Paderborn sub helpo de la instru-aŭtomato Robbimat II de la FEoLL-instituto pri pedagogia kibernetiko (direktoro Profesoro d-ro Helmar Frank).

En Paderborna elementa lernejo ili partoprenis Esperanto-instrulecionon sub gvido de Hermann Behrmann, la prezidanto de la Eŭropa Klubo. Senatoro Rasch akcentis, ke li forte subtenas kunlaboron de la Paderborna centro kun elementa lernejo de Berlino, kie oni povas apliki la samajn programojn. Krome oni volas traduki la programon por la germanlingva instruado al gastlaboristaj infanoj. D-ro Stroux, kiu multjare instruis en fama malnovlingva gimnazio de Berlino la latinan kaj grekan, deklaris, ke la planlingva instruado en la tria kaj kvara elementlerneja jaro ankaŭ plenumas fortan deziron de la malnovlingva gimnazio kiel preparon de la latinlingva instruado en la kvina lerneja jaro. Sufiĉe longa interparolo kun la laŭjura direktoro de la esplorcentro, ministeria konsilisto Kurt Seelmann, kaj la direktoro de la FEoLL-instituto pri kibernetika pedagogiko, prof. d-ro Helmar Frank, traktis ĉefe la temon kiamaniere kunlabori kun la Berlina kulturministerio.

Dum festa tagmanĝo la Berlina delegacio ankaŭ renkontiĝis kun la urba direktoro W. Ferlings kaj deputitino Ellen Rost, kiuj kore bonvenigis la gastojn en la paderurbo. Oni eble konstruos en Paderborn t.n. "malfermitan lernejon", modelon kiu volas eviti la malavantaĝon de la ĝisnuna integrita tuteca lernejo.

## Berlina infan-ĥoro kantos E-kanton

Berlino (Okc.) pp - Okaze de la jubilea koncerto de la Berlina infan-ĥoro, sabate, la 6-an de decembro, 1975 je la 17-a horo, en la salono de la filharmonio de Berlino estos prezentataj internaciaj popolkantoj, eklezaj kantoj kaj kristnaskaj kantoj.

La gvidantino de la ĥoro, s-ino Felicitas Hübbe-Haunert, decidis, ke la ĥoro kantu la unuan strofon de la amerika popolkanto "Klementine" en tri lingvoj: angla, germana kaj Esperanto.

************

Pilo-Press: Internacia Informservo ĉiusemajna, jara abono 30,-- GM.
Kun la germana eldono "END" 40,-- GM. Pagu al
Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851
Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579

Konferenco de Eŭropa Instruista Asocio

Bemelen, NL (eec/pp) - De la 31.10. ĝis la 1.11.75 okazis en Bemelen, malgranda loko sude en Nederlando, konferenco de la Eŭropa Instruista Asocio (EIA). Partoprenis ĉ. 45 personoj, inter kiuj du oficistoj de la Eŭropaj Komunumoj (EK).

S-ro P.A. Daunt, ĉefadministranto de la EK-sekcio pri Edukado, Scienco kaj Esploro, parolis pri la diverseco de la eduksistemoj en la naŭ landoj kaj pri kunlaboro en eŭropa kadro kiu ankoraŭ estas en komenca stadio; la komisiono komencis la laboron pri edukado en 1972.La tasko de la EK-komisiono estas kunordigi novajn iniciatojn por kaj kun la EK-landoj pere de la edukministroj. La celo estas kunordigo de la edukado en Eŭropo (raporto Prof. Janne). Jen kelkaj temoj:

- Dumviva edukado (informado pri la nuna Eŭropo)
- Eŭropa dimensio en instruado de historio, geografio, sociologio, filologio
- Interŝanĝo de instruistoj kaj lernantoj, studentoj (lingvo-instruado)
- Krei eblecojn por novaj eksperimentoj (ŝanĝo de tro tradiciaj eduksistemoj)
- Enkonduko al sociaj problemoj je eŭropa nivelo (polucio k.s.)

De la nederlanda ministerio pri edukado (eksterlandaj rilatoj) parolis mag. H.A. J.M. Vrijhoef, kiu ne estis optimisma rilate al kunlaboro en la edukado. Flanke de kelkaj limigitaj projektoj, li ne atendas multe da harmoniiĝo de la eduksistemoj en Eŭropo.

La Eŭropa parlamentano, C. Laban (Nederlando) parolis pri instruado al infanoj de gastlaboristoj. Multaj problemoj tiurilate ne estas solveblaj momente. Starigo de novaj Eŭropo-lernejoj kaj pli da lerneblecoj por tiuj infanoj estas necesaj. La ekzistantaj Eŭropo-lernejoj estas limigitaj por infanoj de Eŭropo-oficistoj.

Fine parolis la ĉef-administranto de la EK-komisiono por Informado d-ro A. Sprey, kiu pledis por plena eluzo de la eblecoj kiuj ekzistas: realigo de la novaj eksperimentoj kaj esploro al novaj vojoj por integriĝo de la popoloj en Eŭropo.

La ses esperantistoj inter la ĉeestantoj provis dum la diskutoj kaj en individuaj interparoloj veki la atenton por Esperanto. Ni organizis malgrandan ekspozicion kaj disdonis la novan eldonon de la nederlanda ministerio por eksteraj aferoj "Nederlando Koncize", kiu plurkolora libreto vekis la intereson de la ĉeestantoj. Krome ni disdonis la cirkuleron de d-ro Makkink, "La Instruado en Eŭropo".

Kiom gravaj estos la rezultoj de la ĉeesto de espe-rantistoj en tiu konferenco? Tio dependas de la aktiveco de la ILEI-anoj en la EK-landoj, la landaj asocioj kaj la kunlaborantoj de la Eŭropa Esperanto-Centro, kiuj daŭre devus kontakti la eŭropajn parlamentanojn kaj edukministrojn en siaj landoj kaj ankaŭ la EK-komisionon en Bruselo.

Bedaŭrinde s-ro Laban kiu starigis demandojn pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento ricevis neniun reagon aŭ subtenon el aliaj landoj; kompreneble li perdis la intereson en tiu afero. Sed ne jam estas tro malfrue! Skribu nacilingve al C. Laban, Lisztlaan 5, Rotterdam, Nederlando.

La broŝuro "Nederlando Koncize" estas senkoste havebla ĉe ĉiuj nederlandaj ambasadoj. Demandu nur la Esperanto-eldonon!

Valora papilio

Dortmund (pp) - Juvelisto el Dortmund propramane produktis insignopinglon en formo de papilio el oro kun pura kaj rara rubino kaj du diamantoj. Honore al la internacia lingvo Esperanto la juvelisto donis al la juvelo la Esperantan nomon "papilio". Por ĉ. 18 000 GM la "papilio" estas havebla!

Zamenhof-festo en Munkeno

Munkeno (pp) - La 13-an de decembro 1975, la Esperanto-Klubo Munkeno invitas al Zamenhof-Festo, ekde la 10a horo, en restoracio "Landshuter Hof", Arnulfstr. (rekte apud la ĉefstacidomo).

Pedagogia seminario de SEL

Saarbrücken (pp) - Sarlanda Esperanto-Ligo invitas al pedagogia seminario sub la titolo "Metodiko kaj didaktiko de la Esperanto-instruado" en la tempo de la 27.12.75 ĝis la 3.1.76. Ĝi okazos en la naturamika domo Heidenbrunnertal, Neustadt/Weistr., FRG.

La programo sin turnas unuavice al instruistoj kaj pedagogiaj studentoj. La aliĝkotizo estas 20,- GM.

Prelegos Karl Burger, Reinhard Haupenthal, Ivo Lapenna, Helmut Sonnabend, Jean Thierry.

Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler, FRG.

*****************

Esperanto en la radio

Radio Berno. Ges-roj Gacond daŭrigis sian preleg-serion pri "Literatura Mondo". D-ro A. Baur dediĉis sian paroladon al la rilatoj inter Svislando kaj Danlando surbaze de libro, kiu ĵus aperis en Svislando.

Vieno. Bedaŭrinde nun denove la sabat-vesperaj elsendoj de Vieno ĉi-tie en Nürnberg preskaŭ ne estas aŭdeblaj pro troa ĝenado. Estus bone, se la sabata elsendo jam okazus du horojn pli frue, ĉar je ĉ. la 16a horo la stacio estas bone kaptebla. La dimanĉ-matena elsendo je la 6,45 horo estas kontentige aŭdebla. Sed verŝajne aliaj obstakloj malhelpas la aŭskultadon: la dormemo kaj ripozemo! Tamen la programo ĉiam estas varia, interesa kaj aktuala! La kultura artikolo de d-ro Karl Beckmann ĉi-foje temis pri Ludwig Boltzmann kaj la leŭkemia kaj hematologia esplor-isntituto de la Ludwig-Boltzmann-Asocio en Vieno, kiu estis protektata de laŭ sia rango la plej eminenta esperantisto, nome la forpasinta ŝtatprezidento de Aŭstrio, d-ro Franz Jonas.

Romo. Ankaŭ tiu stacio suferas je ĝenoj, ne nur en Nürnberg, sed ankaŭ en München, kiel informis Günter Conrad. La stacio nun sendas sur jenaj ondoj 41,15 m (7.290 kilohercoj), 41,24 m (7.275 khc), 49,92 m (6.010 khc.)

Pekino. Tiuj Esperanto-elsendoj estas ĉiam relative bone aŭdeblaj. La pasintsemajna elsendo detale raportis pri la vizito de federacia kanceliero Helmut Schmidt en Pekino. Speciale ni notis, ke Pekino citis la nomon de FRG jene: "Federacia Respubliko de Germanio". Oni ankaŭ priparolis la novembran numeron de El Popola Ĉinio.

Varsovio. La posttagmezaj elsendoj suferas ankaŭ je atmosferaj perturboj. Sed la matena kaj vespera programo sufiĉe bone aŭdeblas sur la meza ondo 200 m. La Esperanto-Ekspreso raportis pri la vizito de UEA-prezidanto Humphrey Tonkin en Leningrado el korespondaĵo de Leningradaj esperantistoj. A.Pettyn raportis denove pri Finnlando kaj dana esperantisto rakontis pri sia prelegvojaĝo tra Pollando pri Christian Andersen.

Konkurso de POLA RADIO

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.

2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?

3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj - laŭ via opinio - ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO
Warszawa